# *Karavano de Libereco denove eniros en Camagüey*




Camagüey, jan 4 (RHK) Post la turneo de orienta Kubo, la reeldono de la Karavano de Libereco alvenos mardon posttagmeze al la urbo Camagüey, kie ?i estos ricevita en la Placo de la Libereco.

La? Kely Álvarez, unua sekretario de la Provinca Komitato de la Unui?o de Junaj Komunistoj, ?irka? la dua posttagmeze okazos la stafetado de la karavanistoj el provinco Las Tunas, en la Konstitucia Parko, en la komunumo Guáimaro.

En la nomata “Agramontina” teritorio, elstaraj junuloj en studentaj organizoj, artistoj, sciencistoj, sportistoj, kamparanoj kaj batalantoj partoprenos en la simbola evento.

La historia karavano, kiu anta? 63 jaroj estis gvidata de la ?efkomandanto Fidel Castro Ruz kaj gerilanoj de la Ribela Armeo, promenos ?i-posttagmeze tra la centraj stratoj de Camagüey kaj, kiel tiuokaze, ricevos la korinklinon de la popolo.

https://www.radiohc.cu/index.php/eo/noticias/nacionales/281703-karavano-de-libereco-denove-eniros-en-camaguey

Radio Habana Cuba